



aktuala

36-a ELDONJARO

Fondita en 1976 de Leo de Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo "Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge" kun la N°0 419 498 274, honorigita kiel "reĝa" societo ek de la 29a de Majo 1957.

Redaktoro: Paulo Branco, 29 rue Froissart 1040 Etterbeek, panb2001 @ gmail.com; Prezidanto: Angelos Tsirimokos, 405 av. Louise 1050 Bruselo; Kasisto: Jan Amadori, jan.amadori @ gmail.com; Sekretario: Muriel Petit, 57 rue de Douvres 1070 Anderlecht, nurja @ belcenter.com. Kunvenloko n°2 rue Van Maerlant ĉiumerkrede 18h30-20h metroo MAALBEEK (tie nek poŝtkesto nek telefono).

Abona membriĝo nur por adresoj en Belĝujo, 10 eŭroj jare, konto EBG 000-0 123 048-52; Eltiro 150 ekzempleroj.
 In formoj: www.esperantobruselo.org; aktuala.retejo.net; br11.leadhoster.com; ebg.skynetblogs.be; uea.org; paulo.retejo.net; barelo.blogspot.com; esperanto.net; esperanto.be; lernu.net; liberafolio.org; eo.eventeo.net
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala Esperanto ne nepre spegulas opiniojn de ĉefa redaktoro aŭ de EBG- Esperantista Brusela Grupo

ENHAVO

- Paĝo 3 - Kotiz-tabelo ; Peko de Valère Doumont ; Kapriol' en Bruselo
- Paĝo 4 - Gastigi Infanon estas invito de Nuria, aliaso de Muriel Petit
- Paĝo 5 - Augusto Casquero raportas pri Valencia Zamenhof-festo
- Paĝo 5 - Angel Arquillos kaj konflikto de Civito en Malago, Andaluzujo
- Paĝo 7 - Poemaro de Feliks Zamenhof kaj Alberto Garcia Orive
- Paĝo 8 - Bruselano Jacob Hasbun tradukis eseon de Borges
- Paĝo 9 - En la Unua Tago, eseo pri kongresoj de Anna Löwenstein
- Paĝo 12 - Monfalsado laŭ Vikipedio ; Politiko Belga laŭ Birdino
- Paĝo 17 - Liba kaj Floreal Gabalda pri IF en Nördlingen, Bavarujo

PROGRAMO DE LA MERKREDAJ KUNVENOJ

Februaro 2011

- 02 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci
- 09 Semajna kunveno
- 16 Paŭlo Branco prelegas pri Institucioj de Eŭropa Unio
- 23 Semajna kunveno

Marto 2011

- 02 Semajna kunveno
- 09 Kunveno (Karnavalo 8a Marto, poste ekas Karesmo ĝis Pasko 24a Aprilo)
- 16 Semajna kunveno
- 23 Semajna kunveno
- 30 Grupanoj aŭ ne, prelegontoj estas ege bonvenaj, bonvolu sin anonci

ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO



Tri grupaj kunsidoj de EBG dum la merkreda kunveno de 27.01.2011

KOTIZ - TABELO 2011

Nro	Kodo	Kategorio kaj Kotizo	€	Rajtoj
ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO				
11	MEM	Membro de EBG	10	Abono al "Aktuala" (organo de EBG)
12	MEM-R	Membro-junulo (ĝis 26-jara)	5	+
13	MEM-S	Membro-pensiulo, senlaborulo	7	partopreno en la vivo de la Grupo
14	FAK	Familia kunloĝanto	2	Partopreno en la vivo de la Grupo
18	DVM	Dumviva membro de EBG	250	Membreco kaj "Aktuala" dum la tuta vivo (25 X MEM kotizo)
BELGAJ REGIONAJ ESPERANTO-ASOCIOJ				
21	APE	"Association pour l'espéranto"	14	Membro+Abono al "Esperanto en Marche" (parte franclingva)
22	FEL	Flandra Esperanto-Ligo (FEL)	25	Membro+Abono al "Horizontal" (grandparte nederlandlingva)
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO				
31	SA	Abonanto de "Esperanto"	38	Abono al "Esperanto", monata organo de UEA
32	Kto	Abonanto de "Kontakto"	23	Abono al "Kontakto", junulara revuo de UEA
33	MJ	Membro kun "Jarlibro"	25	Membreco en UEA + "Jarlibro"
34	MA	Membro-abonanto de UEA	61	MJ + SA + Kto (se junulo) + rabato !
35	MG	Membro kun "Gvidlibro"	10	Membreco en UEA + "Gvidlibro" (sen la adresaro de delegitoj)
36	SZ	Membro de Societo Zamenhof	122	Honora rondo de esperantistoj, finance subtenantaj UEA
37	MD	Dumviva Membro de UEA	1525	MA de UEA dum la tuta vivo! (25 X MA kotizo)

Kara membro de EBG, bonvolu pagi tuj 10€ abonkotizon 2011 al konto 000-0 123 048-52

PEKO

Printempa E-Kunveno okazos, ek de vendrede 20 ĝis dimanĉe 22 de majo de 2011, en « *château-ferme de Mozet* », 15 kilometroj apud Namuro, Belgujo, fare de APE-Asocio por Esperanto de Valonujo. Organizantoj atendas inter 20 kaj 50 partoprenantojn. Kontakto *doumontvalere (ĉe) yahoo.be*. Retejo: *www.esperanto-wallonie.be*. Finsemajna renkontiĝo por ĉiuj. Kun ampleksa programo : koncerto de jOmO, koncerto de tradicia valona muziko, infana programo, speciala ekskurso, eo-kursoj, ekskursoj, prelegoj... Ni loĝos en kastelo meze de granda arba parko. Facile atingebla per trajno, buso, aviadilo. Aliĝu, venu, ĝuu !

KAPRIOL'



Jam antaŭe anoncita koncerto de Kapriol' : La popolmuzika bando de Frislando, grupo Kapriol', koncertos en Bruselo, vendrede la 15an de aprilo 2011, en salono de la 'Centre Communautaire du Maalbeek', *avenue d'Auderghem 90* (Etterbeek 1040 Bruselo). La koncerto de tia esperantista balfolka danciganta muzikgrupo estos senpaga (donaco de Esperantista Brusela Grupo) kaj malfermita al ĉiuj muzik-ŝatantoj.

GASTIGI INFANON

Pri gastigi infanon iom malfeliĉa : «Baptoinfano ne estas infano in danĝero sed infano al kiu mankas kultura stimulado kaj atento.» (C. Sellenet).

Infanoj kun malfacilaj vivoj pro malriĉeco, dividoj, ekzilo... ni ĉiam scias ke tio ekzistas en Bruselo. Eble kiel mi, vi iafoje demandis vin : "Kion mi povas fari pri tio?". Kun tolerema menso kaj pliriĉigado de ambaŭ, eble vi deziras partigi momentojn el via vivo kun infano kiu estas pli malbonŝanculo. Se jes, la "Service Laïque de parrainage" proponas al vi malfermi vian familion al infano el malpli riĉa medio por ke li povu malkovri alian novan mondon ol mondo kiun li jam konas en sia familio. Konkrete, tio signifas gastigi senpage infanon dum ĉiu dua semajnfino kaj parto de la feria tempo ebligante al li malkovri aliajn vivmanierojn, vivi amuzajn momentojn, renkonti aliajn homojn, havi aliajn identigajn modelojn. Tiu sperto estos riĉa ankaŭ por baptopatroj pro daŭra privilegia rilato kaj lernado de aliaj realoj.

Diris Béatrice en "La Capitale, 12.10.2010": "Baptopatriĝi vi deziras sed ĉu vi ne aŭdacas? Vi faru, ne plu hezitu, ne priploros kaj ankaŭ la infano ne!" Nuntempe, proksimume dek infanoj atendas por havi baptofamilion. Eble la via? Pliajn informojn (en la franca) sur www.parrainage.be.



Nurja & Bianka dum EBG Z-festo, 12.12.2009



<http://xurb.freehostia.com/91212/index2.html>
Bianka eniris mian vivon en septembro 2009. Kelkaj el vi renkontis ŝin dum Z-festo 2009 en Bruselo. Ŝi vivas kun mi dum ĉiu dua semajnfino. Tio ŝanĝas mian horaron, sed ĉefe tio pliriĉigas min, plibeligas mian vivon.

Nurja, Muriel Petit

VALENCIA FESTO

La 22a de januaro 2011 (malfrue iom), oni festis en Valencio (Hispanujo) la Zamenhofan Tagon. Laŭ progame, unue okazis en la sidejo de Grupo Esperanto de Valencio la jaran kunvenon de ties membraro. Estis reelektita kiel prezidanto S-ro José Pérez. Poste du samideanoj, la prezidanto mem, kaj Augusto Casquero de la Cruz, faris la festparoladon, pri Doktoro Zamenhof, pri la signifo de tiu tago, kaj pri la esperanta movado, instigante ĉiujn klopodi disvastigi nian internacian lingvon, kaj klopodi uzi ĝin dum la e-kunvenoj.

Poste ĉiuj iris al apuda restoracio por komune kaj abunde tagmanĝi.



Ĉeestis en la festa bankedo 24 samideanoj.



En la fotoj oni povas vidi la ĉeestantojn en la restoracio.

Augusto 分发作业 Casquero de la Cruz

ANDALUZIA CIVITO

Informo de reta gazeto de AEU, 31.12.2010, N-ro 76 de Esperanta Informado fare de Andrés Martín González, Malago, Andaluzio, martinandres58 @ yahoo.es



Fotoj de Angel Arquillos, agema esperantisto de Malago, prezidanto de Andaluza Esperanto Unio, en la Itala Kongreso de Linjano, 25-08-2010 kaj en la Kataluna Semajno de Comarruga, 10.10.2010

Afero : Letero de Esperanta Civito al Andaluza Esperanto Unio.

Dato de la letero: 2.1.2010

Adresito : Je la afabla atento de s-ro **Angel Arquillos López**, prezidanto de AEU kaj ĉefredaktanto de "Monate ĉe vi".

Temo : Eraroj en "Monate ĉe vi" n-ro 89 porinforme al AEU-membroj.

Enhavo :

En la protokolo de la eksterordinara jarkunveno de AEU, p. 9 de via bulteno, enestas frazo kun du gravaj eraroj:

"En ningun caso AEU puede estar en el pacto con la [Esperanta] Civito, debido a los problemas creados por la futura Esperanto-Domo y a la decision de dos miembros: Carmen Sansegundo y Angel Arquillos Lopez, que dejan definitivamente la Esperanta Civito, por lo que en AEU solo hay tres miembros de dicho consorcio."

6



Fotoj : <http://xurb.leadhoster.com/101002/>

Fotoj : <http://xurb.leadhoster.com/100821/>

La eraroj estas la sekvaj:

1) mensogo pri la nombro de la AEU-anoj kun la Esperanta civitaneco: ili ne estas 3 (tri), sed 11 (dek unu), ne enkalkulante San-Segundo, Arquillos kaj alian rezidantan ekster Hispanio (entute do 14); ĉiukaze, la membreco en la Pakto eblas eĉ se nur unu persono de la paktinta stablo havas la civitanecon;

2) aserto ke la Esperanto-Domo kreis problemojn al AEU: neniu problemo estis kreita al AEU. La Esperanto-Domo en Malago estas projekto ellaborita kunlabore kun la AEU-estraro kaj malagaj AEU-membroj: se AEU ne plu deziras partopreni en la projekto, simple la projekto ne realiĝos, ĉar la Esperanta Civito estas subsidua al la paktintoj, konsekvence ĝi ne altrudas investojn kiujn ili mem ne akceptas. Eblas, ke alia paktinta stablo registrita en Andaluzio (Esperanta Naturamikaro) decidus partopreni en la projekto, kaj tial

eventuale ĝi realiĝos, sendepende de AEU, sed ne kontraŭ AEU: tio tute ne kaŭzas konflikton kun AEU.

Necesas ankaŭ precizigi ke, ĝis nun, la du menciitaj gecivitanoj ne aktivigis la proceduron por rezigni pri la civitaneco: ili komunikis rezignon pri siaj civitaj oficoj, kaj tio estas registrita de la ekzekutiva instanco; sed ili ne komunikis la rezignon pri la civitaneco al la justica instanco, la sola kiu traktas ĉi tiujn kazojn.

Kiel vi povas konstati, ne ekzistas juraj aŭ formalaj kaŭzoj kiuj devigas al AEU eliri el la Pakto. Se tio okazus, tio dependus de ne motivita decido, ĉiukaze sen premo de la Pakta flanko.

Ankaŭ por retiriĝi el la Pakto ekzistas proceduro: necesas sendi la koncernan assemblean protokolon, kun subskriboj kaj akompana letero, al la Kortumo.

Tiu proceduro estas praktike la sama plenumita por eniri la Pakton, solaj diferencoj estas la adreso al kiu skribi kaj ke, dum la aliĝo estas senpaga, la malaliĝo kostas 640,- svisajn frankojn (512,- eŭrojn). Pri tio vidu ankaŭ en : <http://www.Esperantio.net/index.php?id=1537>. Oni atente konsideru ĉiun rajton perdotan de AEU, en kazo de retiriĝo.

Ni antaŭdankas pro la publikigo de ĉi tiu preciziga letero en via bulteno, kaj pri la atento al ĝia enhavo dum la estonta AEU-sembleo.

Amike kaj civitane, Giorgio Silfer, konsulo

POEMARO

LIN VIDIS EN ĜARDENO

Lin vidis en ĝardeno –
ekplaĉis li al ŝi.

Ŝi nomis sin Heleno,
Anton' sin nomis li.

Ekamis la konato
kaj reciproke ŝi;
post paso de monato
ŝanĝiĝis "Vi" al "ci".

Someraj tri monatoj
trapasis dolĉe for,
kaj niaj geamatoj
jam estis kor' ĉe kor';

kaj per solena beno
de l' pastro en la fin'
Antono kaj Heleno
jam estis edz'-edzin'.

En ĉarma harmonio
ekvivis edz'-edzin',
najbaroj kun envio
rigardis lin kaj ŝin.

Sed baldaŭ edzo estis
plej malfeliĉa hom',
kaj jam tre ofte restis
li ekster sia dom'.

Kaj fine eksedziĝis
Antono kaj Helen';
belul' ia aliĝis
al ŝi en la ĝarden'.

Feliks Zamenhof (1868-1933),
Versaĵo sen fino,
Fundamenta Krestomatio, p.395-397

7

AŬSKULTU MIAN KORON

Aŭskultumu mian koron;
rimarku kiel funkcias,
ĉar vi ankoraŭ ne scias,
ke ĝi havas strangan moron,
-kaj ankaŭ havas fervoron
al vi-, ĉar per senfina
koro-batado rutina,
anstataŭ "paf-paf-paf!" sono,
nuntempe, la muziktono
estas: "Re-gi-na; Re-gi-na!...."

Alberto Garcia Orive, 3.12.2010, Bilbao



Alberto bierumas kun Regina en Olštino
kaj kun la redaktoro en la UK Bjalistoko

8

ENJOYMENT OF LAUGHTER

Libro de Max Eastman Novembro 1937

Ĉi tiu libro montriĝas jen kiel
analizo de humuristaj procedoj, jen
kiel antologio de humuraĵoj: la
bonaj kaj la aliaj. La aŭtoro
neniigas la alte neniigeblajn
teoriojn de Freŭdo kaj Bergson,
sed ne mencias tiun de
Schopenhauer (*La Mondo estiel*
Volo kaj Prezento, ĉapitroj 13-a
de la unua volumo, 7-a de la dua),
kiu estas multe pli subtila kaj
kredebla. Malmultaj rememoras
ĝin. Mi suspektas, ke nia tempo
(influita de Schopenhauer mem) ne
pardonas al ĝi ĝian intelektan
karakteron. Schopenhauer reduktas
ĉiujn ridigajn situaciojn al
paradoksa kaj neatendita inkluzivo
de objekto en kategorion fremdan
al ĝi, kaj al nia ekkonscio de tia
nekonveneco inter konceptaĵo kaj
realaĵo. Mark Twain donas al ni
ekzemplon pri tio: « Mia
horloĝeto malfruis, sed,
korektigite, ĝi tiom fruis, ke ĝi
rapide tre antaŭiĝis al la plej bonaj
horloĝoj de la urbo ». La procedo,
tie, estis jene: ĉe la vetkuraj
ĉevaloj kaj ĉe la pasaĝerŝipoj, la
kapablo preterpasi la aliajn estas
inda; sendube, estas same
koncerne la horloĝojn... Mi serĉas
alian ekzemplon kaj trafas jenan
konfidencon de Laurence Sterne:
« Mia onklo estis homo tiel
diligenta, ke ĉiufoje, kiam li
necesis razi al si la barbon,
senhezite li iradis mem al la

barbistejo ». Ankaŭ tie ŝajnas
plenumiĝi la leĝo de
Schopenhauer. Fakte, plenumi
farendaĵojn persone povas esti
virto; komikeco fontas el nia miro
pri tio, ke la faro laŭdata de la
admiranta nevo estas fakto tute
netransdonebla kaj el inter la plej
ordinaraj: razigi al si la
barbon...deklaras Schopenhauer, ke
sia formulo aplikeblas al ĉiuj
ŝercoj. Mi nescias ĉu ĝi veras;
ankaŭ mi nescias ĉu tia fakto sola
efikas en ambaŭ ŝercoj, kiujn mi
ĵus analizis. Mi invitas mian
leganton apliki ĝin al jena amuza
dialogo, kiun mi legas en la libro
de Eastman:

« - *Ĉu ni ne jam vidis unu la alian
en Cincinnati?*

-*Mi neniam estis en Cincinnati.*

-*Mi ankaŭ ne. Sendube estis du
aliaj.* »

Ne malpli magia (kaj pli kongrua
kun la tezo de Schopenhauer) estas
jena aserto, kiun mi transkribas el
la paĝo 78:

« *Oni surtabligis tiel grandan
ostron, ke necesis du homoj por
ĝin sorbi.* »

Enjoyment of Laughter [Ĝuo per
ridado] estis laŭdata de P. D.
Wodehouse, Stephen Leacock, Anita
Loos and Charlie Chaplin.

Eseo de Jorge Luis Borges: Recenzoj
por revuo El Hogar de Buenos Aires 1936-39
Jacob Hasbun tradukis el la hispana

EN LA UNUA TAGO.

En la unua tago, Dio kreis la Inaŭguron. En la dua tago Li kreis la komitatkunsidojn, en la tria la Tagon de la Lernejo, en la kvara la ekskursojn...

Merkredo dum la Universala Kongreso estas la ekskursita tago. Ĉiuj scias tion. Aŭ preskaŭ ĉiuj. Ĉi-jare (2003) venis al Gotenburgo nova kongresano el nia loka Esperanto-grupo ĉi tie en Frascati. Ĉar neniu avertis lin pri la paŭzo meze de la kongresa semajno, li ne mendis ekskurson por tiu tago kaj malkovris kun malagrabla surprizo, ke en la merkredo okazas nenio. Li ja venis al Svedujo, pagis la hotelon ankaŭ por tiu tago, kaj nun ne sciis kion fari. Poste li demandis min, iom kolere, kial la ekskursita tago ne okazas fine de la kongreso. Mia respondo tekstis pli-malpli, "Nu, mi ne scias, la ekskursoj ĉiam okazas merkrede... nu, do, ĉar simple estas tiel."

Pripensante la aferon poste, mi pensis, ke tamen li pravus. Mi mem ĉiam trovas tiun interrompon de la kongresaj laboroj sufiĉe ĝena. Se oni ne ekskursas oni apenaŭ scias, kiel pasigi tiun tagon. Oni aldoniĝas al la rondo de tiuj kiuj vagas sencele ekster la ferma kongresejo kiel perditaj animoj al kiuj oni neis la eniron en la paradizon. Sed neniam venis al mi la ideo, ke io estus farebla pri tio: simple mi akceptis la regulon – merkrede, ekskurso – kiel neŝanĝeblan manifestiĝon de la Dia volo.



Anna Löwenstein kun edzo Renato Corsetti kaj la redaktoro, en Turkujo dum la 3a Mezorianta E. Kunveno, Aprilo 2010

Sed nun mi ekdemandas min: ĉu efektive ne estus pli oportune, se la ekskursita tago okazus en la fina sabato? Tiel oni forigus tiun ĝenan interrompon meze de la semajno. Sabate, tiuj kiuj dezirus povus rekte iri hejmen, aliaj povus ĉeesti tagajn ekskursojn aŭ tuj komenci la postkongresajn aranĝojn.

Alternative, la postkongresaj aranĝoj povus kiel ĉiam komenciĝi dimanĉe, tiel ke turismemuloj havus eblecon ĝui apartan ekskurson dum la sabato. Tio ankaŭ havus la avantaĝon aldoni plian duonan tagon al la kongreso. La Fermo evidente okazus vendrede posttagmeze, do la

10

vendreda mateno estus disponebla por pli da kunvenoj, estrarkunsidoj, kaj la aliaj aranĝoj per kiuj kongresanoj kutimas amuzi sin.

Ekestus la demando, kio okazus en la vendreda vespero post la Fermo. Tiu povus esti la okazo por la bankedo kaj balo, kiuj tiam provizus agrablan distran finon al la kongresa semajno. Cetere, estus disponebla unu plia vespero – sed ne maltrankviliĝu: por tiu kroma vespero mi havas proponon, kiun mi priskribos sube.

Nu bone, eble la ekskursita tago ne datas de la ekesto de la mondo, sed se ne tiam, kiam komenciĝis tiu kutimo? Ĉu eventuale jam dum la unua kongreso en Bulonjo-sur-Marco? Tio tute ne surprizus min. Kiom da aferoj ni faras dum niaj kongresoj ne ĉar ili estas aparte oportunaj sed simple pro tradicio? Estas tiom da aranĝoj, kiuj okazas tutsimple ĉar ili ĉiam okazas: la Solena Inaŭguro, la Kongresa Universitato, la Internacia Arta Vespero, la bankedo... Se ni nun okazigus la unuan Esperanto-kongreson anstataŭ la 89an, ĉu ni nepre decidus fari la aferojn precize tiel? Eble jes – sed eble ni tamen decidus organizi ilin alimaniere.

Kaj cetere, pri tiu bankedo... Lastatempe mi aŭdis komenton, ke ĝi estas tre multekosta kaj elitisma aranĝo, kiun multaj kongresanoj ne havas la eblecon ĉeesti. Eble oni povus pensi pri io malpli pretenda kaj pli populara, kiun ĉiuj kongresanoj rajtus ĉeesti per

prezento de bileto, kiun ili ricevus kune kun la kongresaj dokumentoj. Tio iom altigus la bazan kotizon, sed eble ne tiom, se temus pri amasa aranĝo – kaj cetere, ni ja ĉiuj devas manĝi, ĉu ne?

Kaj kion diri pri la kongresejo mem? Ni ĉiam elektas tre luksajn kaj imponajn centrojn, kiuj donas bonan impreson al la ekstera publiko. Tio estas tre agrabla – sed mi neniam konstatis, ĝis kiu grado tio kontribuas al la alteco de la kotizo. Kiel membro de la LKK por la estonta kongreso en Florenco, 2006, mi estis ŝokita pro la malkovro ke la kongresejo (laŭ oferto ankoraŭ prinegociata) kostos proksimume 175.000 eŭrojn. Tio signifas, ke se ĉeestos, ni diru, 2500 kongresanoj, la unuaj € 70 de ĉiu kotizo estus destinitaj nur por pagi la kongresejon – eĉ antaŭ ol konsideri aliajn kostojn.

Estas vere, ke por kelkaj el ni, tiu estas relative malgranda sumo kompare kun la kosto de la vojaĝo, la restado ktp. Sed estas aliaj kongresanoj, kiuj apenaŭ sukcesas kovri tiujn aliajn kostojn, kaj por kiuj la tre alta kotizo estas la fina bato. Ne estas surprize, ke en Gotenburgo estis signifa nombro da homoj kiuj provis ĉiamaniere eniri senpage.

Tio portas nin al pli ĝenerala demando pri la celo de la kongresoj. Mi povas pensi pri pluraj eblecoj:

1. Taŭge prezenti la Esperantomovadon al la ekstera mondo;
2. Ebligi kontaktojn inter aktivuloj;
- 3.

Doni al kiel eble plej granda nombro da esperantistoj la eblecon partopreni en internacia kunveno; 4. Plifortigi la financojn de la koncerna nacia asocio kaj de UEA. Ĉiuj estas gravaj kompreneble, kaj iugrade ĉiuj okazas samtempe. Sed mi mem supozas, ke la tria celo estas la plej grava, sekvata de la dua. Se la ĉefa celo efektive estus ebligi al la plej granda nombro da esperantistoj partopreni, tio signifas ke oni devus zorgi, ke la kotizo kaj la restadkostoj ne estu tro altaj. Alivorte, la organizantoj zorgu, ke krom la pli luksaj hoteloj estu ankaŭ multaj meznivelaj kaj malmultekostaj, krom junulargastejoj kaj amasloĝejoj – kaj eble necesus serĉi malpli pompajn kongresejojn. Universitata kunvenejo ekzemple verŝajne kostus malpli ol vera kongrescentro, kaj samtempe substrekus niajn kulturajn kaj edukajn celojn. Sed supre mi promesis proponi novan manieron pasigi unu el la kongresaj vesperoj. Denove mi estas inspirita de mia amiko el la loka klubo en Frascati, kiu plendis, ke li ne ricevis ĝeneralan bildon pri la stato de la movado. Mi proponas, ke unu el la vesperoj estu dediĉata al “Movada Foiro”. Ĝi funkcius jene: Tra la kongresejo, prefere en unu granda halo, se tio eblas, oni disponigu amason da tabloj, kie asocioj kaj instancoj povus prezenti sian agadon. Ĉiu landa asocio, ĉiu faka asocio, ĉiu movada kaj kultura instanco, ĉiu eldonejo ricevu

11
tablon, kie ili montros ekzemple siajn afiŝojn, siajn informfoliojn, siajn eldonaĵojn, fotojn de sia agado kaj simile.



Löwenstein kun Corsetti

Tie ili ankaŭ rajtus vendi aŭ senpage disdoni materialojn (evidente necesus tamen eviti konkurencon kun la libroservo): ne nepre nur esperantaĵojn, sed ankaŭ tipajn produktaĵojn aŭ manĝetaĵojn de la propra lando. Dume okazus neformala koncerto de esperantaj kantistoj kaj grupoj. Tiel dum la vespero oni povus vagi de tablo al tablo, vidi kion oni faras en diversaj anguloj de la mondo, informiĝi pri novaj projektoj, babili kun la ekspoziciantoj, aŭskulti esperantan muzikon, kaj espereble samtempe gustumeti naciajn specialaĵojn. La celo estus prezenti kiel eble plej vastan panoramon de la esperanta agado; tial eĉ nealiĝintaj asocioj rajtus senpage partopreni. Eventuale tiu povus esti malfermita vespero, kiam ankaŭ la ekstera publiko rajtus eniri por viziti la ekspoziciojn kaj la libroservon.

12
Kaj por fini, mi revenos al mia ĉi-supra demando: se vi persone nun aranĝus la tut-unuan Esperanto-kongreson, kiel vi organizus la aferon? Ĉu ĝi okazus en luksa kongresejo aŭ malmultekoste en lernejo? Kion vi metus en la programon? Kion vi retenus el la tradicia programo, kion vi ŝanĝus, kion vi entute forigus? Sed ne rezervu tiujn pensojn por vi mem – sendu viajn ideojn al la revuo!

Anna Löwenstein, jaro 2003

POLITIKO BELGA

Laŭ belga franclingva politikistino, oni ofte diras : Politikisto devas havi elefant-memoron, kamel-karakteron, krokodil-haŭton kaj vipur-langon. Kial ?

- elefant-memoro ? Ĉar oni diras ke elefanto memoras ĉian malbonaĵon eĉ post jaroj;
- kamel-karaktero ? Ĉar oni diras ke kamelo havas kelfoje aĉan karakteron;
- krokodil-haŭto ? Ĉar la haŭto de krokodilo estas dika kaj ĝi ne sentas pikojn;
- vipur-lango ? Ĉar vipuro estas danĝera serpento por homo. Ĝia veneno kapablas mortigi homon.

Birdino tradukis el la franca

Blogoj zorgataj de Birdino : [http://](http://ebg.skynetblogs.be)

ebg.skynetblogs.be ;

esperanto.skynetblogs.be ;

www.ipernity.com/home/birdino ;

b.skynetblogs.be ;

fb.skynetblogs.be = virtualaj kartoĵ ;

bruxelles2003.skynetblogs.be/

archive/2011/01/03/hommes-politiques-et-animaux.html

MONFALSADO

Monfalsado estas falsado, kontraŭleĝa reprodukto de valida, leĝa mono (moneroj kaj monbiletoj) kaj ties uzo en merkato por akiri profiton. Falsa mono ne havas la valoron, kiu estas indikita sur ĝi, kaj do trompas la uzantojn. La monfalsado estas internacie leĝe malpermesita, puninda krimago. En 1929 en Ĝenevo la traktato pri monfalsado estis akceptita de 32 ŝtatoj.



HISTORIO DE LA MONFALSADO

Ekde la plej frua enkonduko de mono, trompistoj ĉiam provis falsi ĝin. Oni jam falsis monerojn (ekz. denarojn per argilfandujoj) en la antikvo, mezepoko plej ofte ŝparante la noblajn metalojn dum produktado.

Anglujo kontrabandis inter 1790 kaj 1796 grandan kvanton da monbiletoj (asignatoj) en Francujon por malfortigi la revolucion. Napoleon Bonaparte falsadis sub aŭspicio de la policministro la anglan, aŭstran kaj rusan monojn por detruji, malfortigi la financan situon de siaj malamikoj. Anglujo respondis al tio per falsado de la franca kaj hispana metal- kaj papermonoj.



— "Jen vidu, tiu duonkrono ne taŭgas, ĝi havas neniun randostrekon" — "Fek! Ĝi ja ne havas! Mi ja timis, ke mi ion forgesis."

Hjalmar Schacht en la okupita Belgujo enmerkatis falsitan monon dum la Unua Mondmilito kaj tiel Germanujo preskaŭ senpage akiris krudmaterialojn kaj aliajn varojn el Belgujo.

Inter la du mondmilitoj okazis, ke la sekreta servo de la germana Reichswehr, laŭ la iniciato de generalo Max Hoffmann, pregis francan frankon kaj rusan ĉervonec-rublon (orbazan moneron kun valoro de dek rubloj) por malfortigi la rusan ekonomion kaj apogi la kontraŭrevoluciajn fortojn. La agado estis senvualigita de la germana polico, kiam estis konfiskitaj 1200 kg da falsaj ĉervonecaj biletoj kun la valoro de 12 milionoj da sovetaj rubloj. Tio kaŭzis internacian skandalon.

Frankofalsado okazis ankaŭ en Hungarujo en 1922–25, sed same sensukcese.

En somero de 1927 okazis plia rublofalsado en Germanujo, la krimuloj estis parte enprizonigitaj, sed du sovetaj elmigrintaj falsistoj sukcese fuĝis en Svisujo.



Luma sekureca linio en 20 usonaj dolaroj.

Dum la dua mondmilito, la nazia SS de la germana imperio daŭrigis monfalsadon, dokumentofalsadon sub kaŝnomo "Operaco Bernhard". Oni tiam falsis en granda kvanto monbiletojn de malamikaj landoj (ĉefe de Anglio) por malstabiligi ties ekonomion.

En 1994 oni akuzis Nordan Koreujon pri ŝtata falsado de la usona dolaro, produktado de preskaŭ perfektaj t.n. superdolaroj. Hodiaŭ oni jam ne plu falsas monerojn pro negranda valoro de la monero.



REKONO DE LA FALSA MONO

Oni povas rekoni la falsan monon pere de manko de iu karakteriza simbolo, protekta marko sur la monbileto (metala, sekura fadeno, hologramo, filigrano, mikroskribo, fluoreska propreco).



Falsa banka stampado en peco de oro

La reliefa (profunda) presado faras akraj la fajnajn liniojn, desegnojn, ĉar ĝi kaŭzas diferencon en la farbo-dikeco. Oni intence uzas specifajn bazmaterialojn por la mono kaj komplikajn desegnaĵojn. La disvastigo de altkvalitaj koloraj presiloj malfaciligis rekoni la diferencon inter veraj kaj falsaj monbiletoj. Tial nun kelkaj landoj enmetas hologramojn en la altvalorajn biletojn aŭ presas la monbiletojn sur travidebla plasta folio, lasante specialforman fenestron (ekzemplo estas la novzelanda dolaro).

Ekzistas nun nur unu vere sekura metodo por marki verajn biletojn. Ĝi konsistas en la surpresado de nombro, kalkulita el sekreta ŝlosilo kaj el la pozicio de specialaj fibroj en la papero. Ĉar la pozicio de tiaj fibro estas ne influebla, sed nur post produktado mezurebla, necesus la scio de la sekreta ŝlosilo por produkti "verajn" bankbiletojn. Nun neniu lando en la mondo aplikas tiun metodon.



FAMAJ MONFALSISTOJ

- Frank William Abagnale Jr., – li uzis 8 diversajn identecojn por kaŝlabori, inter kiuj la unua identeco kiel piloto de Pan American Airlines Frank Williams, kaj dum 5 jaroj sume enmerkatis pli ol 2,5 milionojn da usonaj dolaroj kiel falsajn ĉekojn en 26 landoj kaj ĉiuj 50 usonaj ŝtatoj. Li estis arestita en Francio, antaŭ la giĉeto de Air France, kiam la giĉetisto rekonis lian vizaĝon laŭ la polica afiŝo, li estis forportita reen al Svedujo, kaj poste al Usono. La filmo Catch Me if You Can svage baziĝas sur eventoj el lia vivo.

- Anatasios Arnaouti – brita monfalsisto kun pli da 2,5 milionoj pundoj da falsita mono, kondamnita en 2005.

- Abel Buell – amerika koloniisto, kiu komencis ŝanĝi la pregilon por kvin-punda monbileto, kaj estis la unua usonano, kiu kreis mapon de Usono.

- Mary Butterworth – monfalsistino en kolonia Ameriko.

- William Chaloner, – sukcesa brita monfalsisto, kondamnita de Isaac Newton kaj pendumita, dronumita kaj kvaronumita la 23-an de marto 1699.



Ĉina falsa mono

- Alves dos Reis – ĝis la fino de 1925-a jaro Reis sukcesis enmerkati en la portugalan merkaton monbiletojn de eskudoj je la valoro de 1'007'963 pundoj laŭ la ŝanĝo-kurzo en 1925, kio egalas al 0,88 % de la fakta MEP de Portugalujo en tiu tempo.

- Stephen Jory – la plej konata monfalsisto de Britujo; li komencis sian karieron per vendado de malmultvalora parfumo en markaj boteloj. Poste li fondis sian propran presejon por produkti kaj distribui proksimume kvin miliardojn da pundoj da falsa mono en Unuiĝinta Reĝlando.

- Rick Masters (fikciulo, ludata de Willem Dafoe) – estas majstra monfalsisto en la filmo de William Friedkin "Vivi kaj morti en LA".



Bileto falsa de 50 000 brazilaj kruzejoj

- Catherine Murphy estis kondamnita pro produktado de falsaj moneroj en 1789 kaj estis la lasta virino, kiu estis ekzekutita per forbruligo en Britujo.

- Samuel C. Upham – la unua konata monfalsisto en Usono, kiu produktis falsan monon dum la usona civila milito. Liaj fiagoj, laŭ trovo de polico, komenciĝis en julio de 1862.

- Wesley Weber falsis biletojn de 100 kanad-dolaroj, kaj enprizonita.



ĈU VI SCIIIS, KE:

- Jam en la 6-a jarcento a.K. falsado de moneroj fariĝis tiom disvastigita, ke laŭleĝa puno por tiu krimago estis ekzekuto. Tiumtempe oni kontrolis monerojn per akraj iloj, ĉar falsitaj moneroj estis nur kovritaj per arĝento, kompare al tutarĝentaj malfalsaj moneroj.



Bileto falsa de 500 Eŭroj

- Dum regnotempo de la imperiestro Klaŭdio en la cirkulado estis tiom da falsaj moneroj, ke modernaj moner-kolektantoj emas pensi, ke ili estis produktitaj sub la aŭspicio de la imperiestro.

- La plej malnova metodo kontraŭbati la monfalsadon estis denuncioj. Tiu, kiu denunciis monfalsiston, estis liberigita de imposto-pago por sia tuta vivo, kaj se li estis sklavo, li ricevis ateston pri libero.

- La monfalsisto Emanuel Ninger estis kondamnita al 6 jaroj de prizono kaj 1 dolaro de monpuno pro monfalsado de 50-dolaraj monbiletoj. La juĝo konsideris la fakton, ke li memstare desegnis ĉiun monbileton kaj tiu laboro estis ege granda.

- En mezepoko en Eŭropo oni uzis jenan metodon por kontroli, ĉu la homo okupiĝis pri monfalsado aŭ ne: oni metis la suspekto-elvokan moneron en unu manon de li, kaj en la duan la ruĝe varmigita ferostango. La komisiono atente priesploris la vizaĝon de la homo -- la reago al la monero, se tiu estis falsita, devis esti la sama, kiel okaze de varmega ferostango.



Certe ne estas bela artaĵo, sed valoros facile 50 dolaroj

- Por protekti unuajn paperajn monbiletojn kontraŭ falsado oni presis multajn fajnajn ornamaĵojn sur ili kaj uzis specialajn tiparojn por teksto. En Suda Karolino, ekzemple, la anglaj vortoj estis presitaj per hebrea kaj helena alfabeto.

- En Pensilvanio por protekti monbiletojn oni presis la nomon de la ŝtato kun diversaj eraroj sur monbiletoj kun diversa valoro. La falsaĵo kutime estis presita kun korektita teksto.

- En mezepoko oni ne tranĉis monbiletojn, sed ŝiris ilin, kaj la parto de monbileto restis en speciala storejo. Poste oni povis ĉiam kontroli, ĉu la monbileto estas valida, per komparo de la ŝiro sur la bileto kaj sur ties parto el storejo – ili ja devis kompletigi unu la alian.

- En la 60-aj jaroj de 19-a jarcento multaj ŝtatoj preferis simple aĉeti la ilojn de monfalsistoj. La usona registaro iam tute senskandale aĉetis tutan kontraŭleĝan monfabrikon kontraŭ 25 mil usonaj dolaroj.



Falsaĵoj dolaraj usonaj kaj kanadaj

- Sur la unuaj monbiletoj en Kanado oni presis specialajn magiajn parolojn de sorĉistoj kaj ŝamanoj, kiujn kutimaj homoj neniam kuraĝus kopii pro timo alvoki la koleron de malicaj spiritoj.

- En Turkujo oni decidis, ke se oni volas presi sian propran monon, oni faru tion laŭleĝe. Nun ĉiu deziranto rajtas presi sian propran monon, se li havas specialan licencon.

- Administrado de Irako decidis tute aboli akvosignojn kaj protektajn fadenojn en siaj monbiletoj, uzante anstataŭe la imitaĵojn. Nun oni povas tuj identigi la falsadon, se la monbileto havas veran akvosignon kaj fadenon.



El Vikipedio

17

LA 27-A I.F. EN NÖRDLINGEN

27.12.2010 - 3.1.2011 Internacia

Festivalo kun kadra temo: *Lingvoj*

Denove post unu jaro ni renkontiĝis en la bela bavara urbo Nördlingen por festi la 27-an IF. La urbo bonvenigis nin impresige blanke vestita. Pro rigora malvarma kaj neĝa vetero trajnoj malfruis kaŭzante al multaj partoprenantoj problemojn. Al la aranĝo aliĝis 111 personoj el 17 landoj, sed ne ĉiuj povis veni. Tamen la festivalo estis tre sukcesa. Belkolora IF-broŝuro konatigis nin kun la semajna programo. Ni ĝuis altkvalitajn prelegojn kaj vesperajn kulturajn prezentaĵojn. Pluraj prelegoj traktis la kadran temon pri lingvoj; ni povis konatiĝi kun la hebrea, armena, nederlanda, luksemburga, dana, rusa kaj ankaŭ kun lernigaj teknikoj por lingvoj. Tacuo Huĝimoto el Japanio klarigis pri idiolekto, dialekto kaj idiomato. Krome oni povis sperti gestan lingvon kaj lingvon de fabeloj. **En la mondo ekzistas miloj da lingvoj, sed nia Esperanto estas la plej facila kaj belsona.** Ni praktikadis ĝin ĉiutage en gaja, agrabla kaj amika etoso.

Estis okazo promeni en la urbo, rondiri la urban muregon, viziti preĝejan turon kaj lokan muzeon. Plurfoje ni povis sekvi vojaĝprelegojn kun allogaj bildoj: tra Rusio al Mongolio per transsiberia trajno, pri Kubo, Brazilo kaj Bona Espero, Maroko

18

de la nordafrika Atlaso ĝis Saharo, ĝui bildfabelojn kaj aŭskulti operojn.

Aparte interesaj prelegoj temis pri: kosmo kaj meteorŝtonoj, pri longitudo, pri reta esperanta proverbaro, pri vintraj sportoj, pri efiko de korea ginsengo kaj kuracado laŭ metodo de pastro Kneipp, pri Aleksandro Dumas kaj Antoine Galland kaj aliaj. Pri perkomputila foto-prilaborado konatigis nin Rémy, kiu mem sukcese spertiĝas en tiu-ĉi ŝatokupo. Per mandalismo ni provis trovi solvojn pri la estonteco de IF. Tuj naskiĝadis ideoj kaj proponoj por plibonigoj... Filmo pri la pasintjara IF refreŝigis memoron pri la antaŭa aranĝo.

Okazis la 4a IVU, skribaj E-ekzamenoj laŭ la normoj de la Eŭropa Referenckadro, funkciis libroservo. "Posidelki" kun Ljuba el Rusio donis okazon agrable babili ĉe teo-trinkado kaj gustumi kelkajn bongustaĵojn el Rusio. Siajn novajn librojn prezentis dum aŭtora horo Mikaelo Bronŝtejn. Matene okazis gimnastiko, posttagmeze jogo, plurfoje eblis ĝui saŭnon. Mi, inspirita de vojaĝado en Kubo, invitis dancŝatantojn al afrokuba dancvespero. Interkonan, distran kaj internacian vesperojn gvidis Mikaelo Bronŝtejn, dagestanan vesperon Aĥman Junusov. Josi Ŝemer preparis interesan kvizon. Nia magiisto Triksini amuzis nin per novaj trukoj.



Bela paro Liba kaj Floreal Gabalda

Ĉiuvespere ni kunĝuis restadon en nia ŝatata "Knajpo".

La 30-a de decembro ni tradicie ekskursas. Ĉi-foje ni vizitis la bavaran ĉefurbon - Munkeno. Tie ni tagmanĝis en barelforma restoracio kaj iom promenis en la urbo. Sed la plej interesa kaj atendata parto de la semajno estas la silvestra nokto kun abunda bufedo, balo inaŭgurita per polonezo kaj speciale festa etoso dum bonvenigo de pluraj Novjaroj laŭ la diversaj horzonoj de la ĉeestantaj partoprenantoj. Do, brakumado, tostado kaj kisoj tiuvespere abundas.

Korajn dankojn kaj gratulojn al nia ĉeforganizanto Hans-Dieter Platz (HDP), kiu sukcese dum pluraj jaroj aranĝas por ni neforgeseblan semajnon kaj zorgas pri ĝia bona disvolviĝo. Jarfine ni renkontiĝos en la 28a IF, ĉi-foje en Xanten. Bonvenon al vi ĉiuj!

Liba Gabalda, Francujo



Nördlingen



27a INTERNACIA FESTIVALO



27.12.2010 - 3.1.2011



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda

HUGUES DE KEYZER



Nova retestro de EBG